




tejo
tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

Komuna seminario de de aziaj junuloj en Sud-Koreujo



**Recenzo de la
esperantlingva
filmo *La Patro***

**Nova rubriko:
Esperanto en
Interreto**

**Informoj kaj
novaĵoj de
Vinilkosmo**



Saluton!

Ĉi tiu numero sufiĉe malsamas al la antaŭa numero: Anstataŭ novaĵoj kaj informoj el la interna vivo de TEJO, ĉi-foje vin atendas diversaj interesaj raportoj el la plej diversaj partoj de Esperantujo: rapo-

to pri renkontiĝo de aziaj gejunuloj en Sud-Koreujo, raporto pri informado ĉe la lingva foiro Expolingua, inform-plena artikolo pri la Esperanto-muzik-eldonejo Vinilkosmo, recenzo de la Esperantlingva filmo *La Patro el Brazilo*, nova rubriko pri Esperanto en Interreto kaj pluraj aliaj interesaĵoj.

Tamen la fakto, ke du longaj artikoloj de ĉi tiu numero estis verkitaj de mi mem, montras ke denove venis al mi maltrio da kontribuoj de la membraro. Do se vi faras iun raportindan agadon, vojaĝis al interesa Esperanto-renkontiĝo aŭ emas recenzi iun muzik-albumon aŭ libron, pripensu verki ion por TEJO Tutmonde, por ke nia gazeto daŭre restu kiel eble

plej diverseca kaj interesa por ĉiuj TEJO-membroj. Mi volas ankaŭ atentigi pri tio, ke ĉiu povas kontribui al la nova rubriko Esperanto en Interreto per informado pri iu interesa Esperanta retpaĝaro; aldone daŭre ekzistas la rubriko TEJO-membroj, en kiu ĉiu povas prezenti sin mem.

Mi deziras al ĉiuj agrablan legadon de ĉi tiu numero, kaj al la verkemuloj agrablan verkadon de kontribuoj por la venontaj numeroj!

Via redaktisto,
Marcos

Enhavo

Komuna Seminario en Azio	3
Nova rubriko: Esperanto en Interreto	4-6
EU financo peresperantan tradukprojekton de infanlibroj	6
La Patro – emociiga filmo el Brazilo	7
Spertoj dum informado pri Esperanto ĉe Expolingua	8-11
Nekrologoj	11
Vinilkosmo – kie la Esperanto-muziko estas produktata	12-14
Konkurso Partoprenu IJK-n 2008	14
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO	15
Esperanto kiel ponto-lingvo NUN	16
Aperos nova lumdisko pri Esperanto	16

Limdato por 2008:4 – 15-a de julio 2008!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Jenischstraße 54, 22609 Hamburg, Germanujo. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton. Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Komuna Seminario en Azio

La 26-a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj (KS) okazis en Iksan, Korea respubliko, ekde la 28-a ĝis la 30-a de decembro, kun la temo: La rolo de gejunuloj por paca kunvivado de Ĉinio, Japanio kaj Koreio.

Du homoj el Ĉinio, dek unu el Japanio, unu el Malajzio, unu el Ganao (Afriko), kaj tridek kvin el Koreio, do sume 50 homoj el 5 landoj, partoprenis en KS. Kun prezido de la prezidanto de seminaria komisiono SONG Ho-young, ni havis viglan diskuton kaj agrablan tempon per multaj programeroj. Okazis ne nur akademaj kaj Esperanto-movadaj prelegoj, diskuto kaj kunsido, sed ankaŭ okazis danco-kurso, ekskurso, bankedo, aŭkcio, koncerto kaj vizito al Ŭonbulisma centro.

Partopreno de antaŭaj KS-anoj kaj aktiveco de partoprenantoj briligis nian renkontiĝon. Kaj oni opinias, ke ĉi-foja KS estis skale malgranda, sed etose tre sukcesa.

3. Por sisteme plenumi la taskon, estas necese plu diskuti kaj kunsidi pri establo de nova organizo, ekzemple "Azia Esperantista Junulara Organizo (AEJO)", kiu ĉefe respondecos organizi kaj okazigi sian eventon.

4. Por glata kaj pli efika komunikado, estas necese krei interretan TTT-paĝon nome de nia nova organizo, por ke niaj estraranoj bone respondecu pri la administrado.

5. Por vigligi junularan movadon, estas utile havi propran kanton kaj alian kulturajn de niaj organizo kaj evento. Volontula komponisto el aziaj junuloj povus krei la kanton kun konsento de niaj membroj. Ni akceptos opiniojn pri teksto de la kanto, kaj elektos la plej bonan per oftaj kontakto kaj kunsido.

2007-12-30

La 26-a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj

Rezolucio

Traktinte la ĉeftemon, la partoprenantoj adoptis jenan rezolucion:

1. Ni konsideru la neformalan strukturon de nuna Komuna Seminario, kaj ankaŭ konsideru junulojn en kromaj landoj, kiuj esprimas intereson pri KS. Estas necese ekpensi pri la sfero de nuna Komuna Seminario kaj pli oficialigi la strukturon.

2. Sur la fundamento de la diskuto, kiun partoprenantoj dividis dum la tempo diskuti, ni daŭre kunsidos por okazigi pli vast-sferan eventon, ekzemple "Azia Junulara Kongreso (AJK)", partoprenotan de junuloj el ĉiuj aziaj landoj.



Esperanto en Interreto

Per ĉi tiu artikolo mi kreas novan rubrikon en TEJO Tutmonde: La rubriko *Esperanto en Interreto* celas listigi kaj klarigi diversajn retpaĝarojn en Esperanto, precipe tiujn, kiuj povas utili al junaj aktivaj Esperantistoj. Ĉiu povas kontribui al ĉi tiu rubriko sendante informon pri utila retpaĝaro al tejo-tutmonde@tejo.org.

Libera Folio

<http://www.liberafolio.org>



Libera Folio estas reta gazeto pri la Esperanto-movado kaj pri Esperanto ĝenerale. Ĝi estas sendependa de ĉiaj Esperanto-organizoj, kaj tial povas pli sobre kaj kritike informi pri la diversaj Esperanto-aktivaĵoj kaj aktualaj evoluoj. La artikoloj kaj la temoj estas tre variaj: de novaĵ-artikoloj ĝis profundaj eseoj, pri la Esperanto-movado, la Esperanta kulturo, Esperantologio kaj ekster-movadaj mencioj aŭ uzoj de Esperanto. Apud la artikoloj publikigitaj de la redakcio, legantoj ankaŭ povas publikigi siajn proprajn novaĵ-artikolojn. Aldone eblas komenti ĉiujn artikolojn, tiel ke ofte estiĝas longaj diskutoj en la komento-parto de iu artikolo...

TEJO.org

<http://www.tejo.org>

Ĉi tiu estas la retpaĝaro de nia organizo. Ĝi entenas la gravajn informojn pri la funkciado kaj la nuna estraro kaj aktivularo de TEJO. Aldone, ĝi ebligas al



aktivaj TEJO-membroj raporti pri siaj aktivadoj (por ricevi la publikig-raĵojn, kontaktu Chuck SMITH: chuck@tejo.org), do en ĝi regule aperas novaj informoj pri Esperanto-agadoj de junuloj el la tuta mondo. Por pliaktivigi TEJO-n en Interreto, estus bone se pli da aktivuloj uzus la eblecojn de ĉi tiu paĝaro. Aldone, TEJO daŭre serĉas homojn, kiuj pretas helpi en la tradukado de la paĝaro al aliaj lingvoj (por tio ankaŭ kontaktu Chuck).

ipernity en Esperanto

<http://www.ipernity.com/home?lg=eo>

ipernity estas retpaĝaro kiu ofertas senpagan retspacon por krei blogojn, publikigi fotojn, filmojn kaj sonaĵojn kaj por partopreni en sociaj retoj. Do *ipernity* estas ĉio-en-unu de la *Reto 2.0*.

ipernity estas nun havebla en naŭ lingvoj; la Esperantan tradukon pretigis kelkaj volontuloj, kaj la ĉina traduko estis kreita de ĉinaj Esperantistoj pere de la Esperanta traduko! Multaj esperantistoj nun havas blogojn ĉe *ipernity*, kaj inter tiuj blogoj estas iuj vere interesegaj, ekzemple tiu de la irana esperantisto Reza (ipernity.com/blog/23187).



La retpaĝaro de Bertilo WENNERGREN

<http://www.bertilow.com>

En ĉi tiu retpaĝaro troviĝas pluraj tre utilaj aferoj:

- La *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG) klarigas la gramatikon de Esperanto tre detale kaj samtempe en maniero



tre facile komprenebla. Ĝi jam ekzistas en la reto ekde la mezo de la 1990-aj jaroj; komence de 2006 ĝi aperis ankaŭ kiel libro, kaj nun multaj opinias ke ĝi anstataŭis la *Plenan Analizan Gramatikon* (PAG) kiel la plej grava kaj sekvinda Esperanto-gramatiko. En la reto ĝi daŭre estas legebla senkoste.

- Listo de *Landoj kaj lingvoj de la mondo*, kiu utilas por ekscii la Esperantan nomon de iu lando aŭ lingvo. Ĉi tiu listo estas pli kompleta kaj pli fidinda ol la tiukampaj informoj en PIV.

- Informoj pri la (ne plu aktiva) rokgrupo *Persone* kaj la popularmuzika Esperanto-terminaro *Roko kaj Popo*

- Utilaj informoj pri la uzo de Esperanto en la komputilo, precipe pri la teknikaj solvoj por uzi la ĉapelitajn literojn

- Kritikaj notoj pri la nova PIV (eldonoj de 2002 kaj 2005)

- Ligiloj al la Esperantologia retpaĝaro *Lingva Kritiko* kaj al la *Tekstaro de Esperanto* (kolekto de Esperantlingvaj tekstoj kun entute ĉirkaŭ 4.300.000 da vortoj, diversmaniere serĉebla por lingvo-esploraj celoj) – ĉi tiuj du paĝaroj estas ankaŭ administrataj de Bertilo, sed havas apartajn retadresojn: *lingvakritiko.com* kaj *tekstaro.com*

- Pluraj aliaj aferoj, interalie la blogo de Bertilo kaj lia edzino Birke, kantotradukoj kaj diversaj interesaj artikoloj

Wikipedia en Esperanto

<http://eo.wikipedia.org>

La interretan liberan enciklopedion *Wikipedia* jam konas la plej multaj retuzantoj en la mondo. Ĉiu povas kontribui por plibonigi kaj pligrandigi ĝin; ĝi estas (kaj ĉiam restos) tute senkosta, kaj nun estas la plej multe vizitata sen-reklama retpaĝaro.



La Vikipedio nun estas havebla en 253 lingvoj, el kiuj 75 havas pli ol 10.000 artikoloj. La Esperant-lingva Vikipedio estis inter la unuaj kiuj havis aktivan kunlaborantaron; nun ĝi havas 96.000 artikolojn kaj estas en la 20-a pozicio laŭ la nombro de artikoloj.

La Esperant-lingva Vikipedio traktas ĉiujn temojn de la homa scio. Interalie ĝi entenas multajn detalojn pri la Esperantomovado, kaj estas la plej granda interreta informfonto pri Esperanto.

Ĉiu kontribuo al la Vikipedio estas tre valora, ĉar ĝi igas la Vikipedion pli utila kaj samtempe pli-prestiĝigas Esperanton en Interreto.

Startu.net

<http://startu.net>



Startu.net estas utila enirpaĝo por

esperantistoj. Ĝi listigas aktualajn artikolojn el diversaj Esperantlingvaj retgazetoj, kiel *Libera Folio*, *Raporto.info*, *Le Monde diplomatique en Esperanto* kaj *esperantujo.org*. Aldone ĝi listigas aktualajn blogerojn el pluraj Esperant-

lingvaj blogoj kaj aktualajn afiŝojn el la Uzret-grupo *soc.culture.esperanto*, kaj enhavas interesajn ligilojn al diversaj Esperantaj retpaĝaroj.

Marcos CRAMER, Germanujo

EU financo peresperantan tradukprojekton de infanlibroj

La Eŭropa Komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu Esperanto rolas kiel pontolingvo. EU financo per 64 000 eŭroj la projekton, en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj, kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

La eldonprojekto, kiun ellaboris por Kroata Esperanto-Ligo Zlatko TIŠLJAR, kaj en kiu partoprenos kiel partneroj Edistudio el Pisa (Italio), Inter-kulturo el Maribor (Slovenio) kaj barata eldonasocio Samatat Siksha-Samatat Prakashan el Kalkato estis aprobita de kulturfonduso de Eŭropa Komisiono (EACEA-Culture).

EU financo la projekton per 64.000 eŭroj. La projekto antaŭvidas ke ĉiuj partneroj (itala, slovena, kroata kaj barata) tradukos el siaj lingvoj unu infanlibron de sia literaturo al Esperanto. Poste la barata partnero plutradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la

bengalan, kaj la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron ĉiu al sia nacia lingvo.

Post kiam ĉiuj eldonos la librojn, oni distribuos ilin en elementaj lernejoj de siaj urboj kaj organizos legokonkurson inter la infanoj. La plej bonaj verkoj de la infanoj pri libro legita kaj apartenanta al

alikontinenta kulturo estos premiitaj. Pri la tuto la eldonistoj daŭre informados la gazetaron, radion kaj televidon.

La barata partnero kunlaboras kun la prezidanto de UEA, Probal DASGUPTA. La projekto estos efektivigata inter majo 2008 kaj majo 2010. Tiu estas la unua tiaspeca interkultura projekto uzanta Esperanton, kiun finance subtenas Eŭropa Komisiono.

Raportis Zlatko Tišljar en
liberafolio.org/2008/eubaratalibro
Laŭ Ret-Info

La Patro – emociiga filmo surbaze de verko el la japana literaturo

En julio pasintjare aperis nova filmo originale esperantlingva: temas pri *La Patro* de Imagu-Filmoj, la brazila entrepreno, kiu antaŭe produktis la filmon *Gerda Malaperis*.

La Patro estas emoci-plena familia dramo: Antaŭ 20 jaroj Rubens NEGROMONTE forlasis sian edzinon kun tri infanoj por travivi am-aventuron kun sia amatino. Post 20 jaroj li neatendite revenas almozpetule kun la espero ke la familio pardonos al li kaj ree akceptos lin. Lia reveno kaŭzas kontraŭajn emociojn ĉe la diversaj familianoj, kaj la filmo surprizige finiĝas per mistera okazaĵo.

La 40-minuta filmo de Joe BAZILIO baziĝas sur verko de la japana verkisto KIKUTI Kan, kaj okupiĝas ĉefe pri la eblo kaj emo pardoni.

Konsiderante ke la aktoroj ne estas profesiaj aktoroj, la aktorado estas sufiĉe bona; precipe impresis min la bona uzado de vizaĝ-esprimoj. Aldone, la emociiga fonmuziko taŭge substrekas la emociojn de la roluloj.


Kvankam la filmo uzas tre bonstilan lingvaĵon preskaŭ sen-eraran (mi nur trovis unu gramatikan erareton en la tuta filmo), iom ĝenas ke la voĉoj ne estas tre bone kompreneblaj. Tio estas kombino de pluraj faktoroj, interalie ilia mallaŭteco kompare kun aliaj sonoj (kiel la fonmuziko), la brazil-portugala intonacio, kaj foje malĝusta fraz-akcentado. Tial indas spekti ĝin kun Esperantaj subtekstoj, por ke oni povu senprobleme sekvi ĉiujn diraĵojn.

Sur la DVD estas subtekstoj en 13 lingvoj (angla, ĉeĥa, Esperanto, franca, hispana, hungara, itala, japana, kroata, pola, portugala, rusa kaj slovakaj). Oni do povas bone montri la filmon al ne-esperantista publiko, tiel atentigante pri la ekzisto de originalaj filmoj en nia Esperanto-kulturo.

Tre interesaj estas la aldonadoj al la disko: intervjuoj kun la aktoroj kaj la produktistoj, per kiuj oni ekscias, ke apud la kvin aktoroj, laboris kvin homoj malantaŭ la scenejo, kaj en kiuj estas interesaj informoj pri la maniero de produktado kaj pri la aktoroj kaj produktistoj mem. Aldone spektblas "Malantaŭ la scenejo" – do scenoj el la filmado mem.

Se vi ankoraŭ ne certas, ĉu aĉeti la DVD-on, vi povas rigardi la antaŭfilmon interrete: tinyurl.com/2qnlpp

Marcos CRAMER, Germanio



Niaj spertoj dum informado pri Esperanto ĉe Expolingua

De Judith MEYER kaj Chuck SMITH, kiuj laboris ĉe la Esperanto-stando tie preskaŭ plentempe ĉijare

Pri Expolingua: Expolingua estas tritaga internacia foiro pri lingvoj en Berlino, Germanujo. (Ankaŭ ekzistas Expolingua en Prago, sed mi ne scias ĉu Esperanto tie prezentiĝis; mi esperas ke jes.) Prezentas sin per stando ĉefe vendantoj de lingvoferioj kaj lingvolerniloj, sed ankaŭ reprezentantoj de landoj kaj lingvoj, ekzemple la kataluna, baska aŭ Esperanto. Almenaŭ 50% de la vizitantoj estas junaj (el lernejoj aŭ universitatoj), ankaŭ ĉar la foiro disdonas al ili senpagajn biletojn. Kostas eble 5 EUR eniri sen bileto, do ne tro forpelas aliajn interesitojn, ekzemple instruistoj, profesiuloj kaj ĉiaj homoj kiuj volas lerni lingvon. La plejparto de ili estas germanoj, ĉefe el Berlino sed ankaŭ

el aliaj landpartoj. Partoprenis ankaŭ sufiĉe multe da rusoj ĉar la rusa estis la ĉijara gastlingvo de la foiro; ne partoprenis multaj anglalingvanoj.

Ekzistis “faka programo”, sed ĉefe temis pri malbone kaŝita varbado por firmaoj kiuj ankaŭ havas standon, se ekzemple firmao kiu vendas lingvoferiojn en Hispanio parolas pri la graveco de lerni lingvon enlande. Atraktivaj programeroj por la vizitantoj estas la etaj lingvokursoj, kiuj provas instrui iom de la lingvo dum nur 45 minutoj. Bedaŭrinde la prelego pri Esperanto havis longegan kaj malallogan titolon, kaj la priskribo de la prelego en la foirolibro estis la plej mallonga el ĉiuj prelegopriskriboj. Verŝajne tial nur 10 homoj partoprenis la prelegon, kiu tamen estis interesa, kompare kun ĉirkaŭ 150 homoj en la prelego pri la japana lingvo.

La Esperanto-stando: La Berlina Esperanto-grupo mendis plej etan standtipon (1m x 1m) kaj metis tie tablon superfluantan kun informiloj kaj libroj/jurnaloj por montri aŭ vendi. Malantaŭ la stando estis spaco por pliaj kestoj kun informiloj kaj seĝo – kaj, iom kontraŭregule, ankaŭ staris seĝoj apud la stando, ekster la luita zono. Ni kovris la malantaŭan muron de la stando per malhelverda ŝtofo kaj sur ĝi metis afiŝojn pri la Printempa Semajno Internacia kaj la venonta semajnfina Esperanto-kurso



Esperanto-budo dum Expolingua

en Berlino. Ni ankaŭ metis Esperanto-flagon supre. Titolo de la stando estis “Esperantoland” – eble malbona elekto ĉar mi aŭdis kelkajn preterpasantojn malagrabla ridi pri ĝi, aŭ ili demandis “Kie estas Esperantoland?” kaj konfuziĝis post niaj respondoj. Kompare kun la aliaj standoj, la stando de Esperanto estis vere unika, ĉar la aliaj standoj ne havis tiel plenajn tablojn (la apuda stando ekzemple nur havis projekciilon surtable, sed fakte la projekciilo malbone funkciis pro malgranda distanco al muro) kaj ankaŭ estis pli blankaj. Eble iom pli malplena tablo aspektus pli profesia, sed mi kredas ke la verda koloro kaj malsameco de nia stando ankaŭ allogis homojn pli longe rigardi. Dumtempe ni ankaŭ metis la komputilon de Chuck surtablen por montri la fimetojn el la serio “Esperanto estas...” kun germanaj subtekstoj, sed, kontraŭe al niaj atendoj, tiuj movantaj imagoj ŝajne ne interesigis homojn halti kaj rigardi. Kelkaj haltis kaj rigardis kiam mi metis la germanan version de la libro “La danĝera lingvo” en bone videbla pozicio, eble mirante kiel lingvo povus esti danĝera. Aliaj standumantoj havis la ideon tiel montri la ĵurnalon Vola Püg’ aŭ la Esperanto-tradukon de la Eta Princo, sed mi ne povas diri ĉu tio ankaŭ allogis homojn aŭ ne.

La informiloj: Ni havis diversajn

informilojn, plejparte de la Germana Esperanto-Asocio (GEA) aŭ la Germana Esperanto-Junularo (GEJ): la asteriksan informilon, “lingvo kiel ludo”, la GEJ-informilojn pri Esperanta kulturo kaj pri Pasporta Servo ... ankaŭ informilon de la Esperanto-urbo Herzberg (kiun neniuj prenis) kaj germanan informilon pri PSI kiel lingvolernad-ferioj. Mankis germanaj informiloj pri IS kaj ĝenerale informiloj pri *lernu!*. Mi fakte petis al E@I sendi al mi informilojn pri *lernu!* kaj eble aliaj projektoj por disdoni tie, sed ili ne faris. Mi devis konstati ke sur la GEJ/GEA-informiloj tute mankis ret-adresoj por libere informiĝi sen devi ensendi poŝtkarton aŭ korespondi kun homo, kaj homoj hodiaŭ ne ŝatas tiel peti informojn ĉar ili timas spamon aŭ atenton de profesiaj konvertistoj. Tio devas esti ŝanĝita kiam estos kreataj novaj informiloj. Por rekte helpi al tiu manko, mi kreis etajn paperfolietojn kun esencaj informoj kaj aldonis ilin al ĉiu eldonita informilo. Sube de ĉi tiu paĝo videblas kiel aspektis tia paperfolieto.

Mi do metis ĉiujn esencajn informojn: por informi sin pri Esperanto mi proponis www.esperanto.info (nova centra retejo celanta ĉefe la eksteran mondon por informi ilin pri Esperanto kaj la Esperanto-movado; mi mem laboras pri ĝi) kaj aldone la kontaktadreson de la Germana Esperanto-Asocio por pliaj



Esperanto

Informationen: www-esperanto-info

Kostenlos online lernen: www.lernu.net

Wochenendkurs in Berlin: www.esperantoland.org/bse/kurs.php

Noch Fragen? deb@esperanto.de oder sprechen Sie mich an

demandoj. Por lerni Esperanton mi proponis la adreson de informpaĝo/aligilo por la venonta kurso en Berlino kaj ankaŭ *lernu!* – kaj mi kredas ke ĉiu informilo, ĉu farita de E@I/*lernu!* aŭ ne, enhavu almenaŭ tiun ligilon, ĉar *lernu!* enhavas pli ol dek bonajn kaj profesiaspektajn Esperanto-kursojn. Mi ankaŭ bonvenus disvastigon kaj subtenon de esperanto.info ĉar stultas se ĉiu klubo kaj ĉiu asocio mem verkas informojn pri kio estas Esperanto. Anstataŭe, ĉiu povas kunlabori por krei la plej kompletajn kaj plej allogajn informojn ĉe esperanto.info.

Je la tria tago ni eldonis informilpakaĵojn anstataŭ unuopaj informiloj: do ekzemple la informilon “lingvo kiel ludo” enhavantan mian paperstripon, la PSI-informilon kaj la informilon pri la venonta berlina kurso (kiu ne pretis antaŭ la tria tago – venontfoje oni pretigu ĝin pli frue), aŭ la informilon pri Pasporta Servo enhavantan ĉiujn kvar. Mi kredas ke tio malpli plaĉis al homoj, ĉar ili volas havi elekton pri kiujn informilojn ili kunportos, sed tamen ili akceptis la pakaĵojn.

La reagoj de vizitantoj: Ni ne nur sidis malantaŭ la stando sed aktive ofertis la flugfoliojn al preterpasantoj. Ni spertis ke tio estas multege pli efika. Junaj homoj ĉefe volis la informilon de Pasporta Servo, kiu en grandaj literoj parolas pri senpaga gastado sur la unua paĝo. Alloganta estis ankaŭ la bildeto de Asteriks en Esperanto. La unua paĝo de la informilo “lingvo kiel ludo” ne estas tiom alloga, eble ĉar oni superfluge eĉ ne povas legi pri kio temas (la vorto

“Esperanto” estas disigita kaj skribita en kestoj). Sed la enhavo de “lingvo kiel ludo” certe estas interesege por homoj, ĉar multaj speciale petis informilon per kiu ili povas informi sin pri la lingvostrukturo. Ankaŭ al homoj kiuj jam diris ke ili ne volas flugfoliojn mi eksperimente ofertis “lingvo kiel ludo”, dirante ke ili povus lerni bazajn esprimojn per ĝi. Tio ŝajne plaĉis al multaj kaj ili decidis tamen kunpreni la flugfoliojn. Nova flugfolio ja enhavu tiajn aferojn.

Alloga estis ankaŭ la Kauderwelschmanlibro kaj la Esperantaj lumdiskoj kun videokurso. Kelkaj volis ilin kunpreni (senpage). Produktado de lumdiskoj hodiaŭ ne multe kostas, do eble ni povus venontjare senpage oferti similaspektajn lumdiskojn (multkolora lumdisko sed sen kovrilo kaŝanta la lumdiskon, eble eĉ nur en papera ujo) kun informoj pri Esperanto. La minoritataj lingvoj de Hispanio ofertis multege da utilaj materialoj senpage: manlibreto pri oftaj frazoj kun lumdisko kun elparoloj, libretoj pri iliaj regionoj kaj lingva situacio, kalendarego/tagplanilo kun frazoj por ĉiutage lerni ion, belaspektaj pingloj, dolĉaĵoj... eble Esperanto povas iomete kopii de ili.

Kun tiuj homoj, kiuj haltis apud nia stando, ekzemple post ricevo de flugfolio, ni komencis diskuti. Efika komenco estas ekzemple “Ĉu vi jam aŭdis de Esperanto?” aŭ “Kion vi sciis pri Esperanto?”. Unu el la standprizorgantoj ankaŭ komencis rekte per klarigo pri kio estas Esperanto. Dum klarigo mi rekomendas eviti la vorton

“artefarita lingvo” kaj anstataŭe diri “planlingvo”, ĉar dirante “artefarita” la vizaĝo de alparolatoj ofte montras instinktan malŝaton. Mi ankaŭ ne tiom parolas pri Zamenhof kaj historio sed fokusiĝas pri la aktuala situacio. Se tamen mi mencias Zamenhof, mi karakterizas lin ne ĉefe kiel okulkuracisto sed kiel homo kiu lernis multajn lingvojn – tio estas pli konvinka fono por lingvokreanto.

La duono de vizitantoj neniam aŭdis pri Esperanto, el la cetero nur malmultegaj estis bone informitaj kaj granda parto pensis ke Esperanto mortis aŭ estas mortanta. Por konvinki homojn ke Esperanto vivas kaj estas parolata en multaj landoj, tre utilis Pasporta Servo; neniuj stando estu sen ĝi. Verŝajne la Jarlibro ankaŭ estus utiliga por tio, sed ni ne havis ĝin. Por homoj argumentante kontraŭ Esperanto kiel reala lingvo ankaŭ utilis la flugfolio pri Esperanta kulturo, precipe por junuloj kiuj certe

iros aŭskulti senkostajn esperantlingvajn mp3-ojn ĉe la brazila paĝaro menciita en la flugfolio.

Generale mi miris ke homoj ĉe Expolingua ne emis argumentadi pri Esperanto; ili estis tre malfermaj por novaj informoj kaj ŝajne multaj nun pripensas lerni Esperanton. Ekzistas homoj kiuj diris ke ili prefere lernos lingvon kiun ili bezonos por ilia laboro, sed neniuj respondis malamike – eble tiuj, kiuj malamike pensas pri Esperanto, rapide preteriris. Eĉ la vizitoj de la Idistoj, kiuj ankaŭ havis standon, pasis senprobleme. Resumante ĉion, mi certas ke estis bonega ideo prezenti Esperanton ĉe Expolingua kaj mi certe ĝuis la taskon. Dankon, GEA, por inviti nin al Berlino!

Se vi interesiĝas pli pri informado pri Esperanto, estas interese rimarki ke FEL ĵus eldonis la libron “Informado Praktike” de Ziko van Dijk.

Nekrologoj

La 22-an de januaro forpasis unu el la plej eminentaj esperantistoj de nia tempo

Claude PIRON (1931-2008)

tradukisto ĉe UN kaj ĉe la Monda San-Organizo, poste psikologo, aŭtoro de populara lernolibro “Gerda malaperis”, de vaste legata “La bona lingvo”, kaj de muzika kasedo “Frandu Piron”. Sub la pseŭdonimo Johan Valano li verkis serion da originalaj Ĉu-romanoj.

Apsana Giri (1981-2008), nepala esperantistino, kiu partoprenis interalie en la 61-a IJK en Zakopane (2005) kaj la 92-a UK en Jokohamo (2007), pereis la 2-an de januaro en aŭtomobila akcidento en Usono.

Vinilkosmo – kie la Esperanto-muziko estas produktata

Kiam oni pensas pri Esperanto-muziko, oni tuj pensas pri Vinilkosmo. Vinilkosmo estas la disk-eldonejo de la Esperanto-rokmuzika asocio EUROKKA. Krom kunordigi la muzikistojn en la studioj de Vinilkosmo en Donneville (Francujo), EUROKKA ankaŭ

- funkciigas la *artistan datenbazon* (artista.ikso.net), kiu celas plifaciligi la organizadon de koncertoj kaj aliaj artaj aranĝoj ene kaj ankaŭ ekstere de Esperantujo.

- diskonigas kaj disvolvas artistojn kaj bandojn kantantajn en Esperanto per helpo, konsiloj, perado, kaj varbado

- instigas artistojn simpatiantajn kun Esperanto ekkanti Esperante

- helpas, konsilas kaj kunorganizas en la programo de Esperantaj artistoj kaj bandoj kadre de Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, kaj festivaloj, kiel UK, IJK, KEF, EOLA, FESTO, IS, IF, IJS, IJF, SAT-Amikaraj kongresoj ktp

- kunlaboras kun internaciaj kaj lokaj radiostacioj (produktas Esperanto-radio-programojn disaŭdigantajn Esperanto-muzikon en lokaj stacioj kiel Canal Sud, Radio FMR, kaj Radio Occitània en Tuluzo)

- prezentas la Esperantan muzikan



kulturon, ĝian historion kaj evoluon, per prelegoj, seminarioj, informkunvenoj ktp

- diskĵokeas per “Espoteko” (Esperanto-Diskoteko) okaze de internaciaj aŭ lokaj renkontiĝoj (KEF, IF, IJK, Zamenhof-Festo ktp).

Vinilkosmo regule eldonas informleteron kun interesaj novaĵoj el la Esperant-muzika mondo. En la lastaj informleteroj troviĝis interalie

- anonco pri la 9a Kultura Esperanto-Festivalo (KEF) okazonta de la 12a ĝis la 19a de julio 2008 en Helsingør, Danio (kef.saluton.dk)

- informo pri paĝoj de Esperanto-muzikistoj ĉe MiaSpaco (MySpace), ekz-e myspace.com/jomoleclerq, myspace.com/stefichjo kaj myspace.com/lapafklik

- informo pri regea grupo el Francio produktanta albumon en Esperanto

- sciigo pri nova servo de la gazeto La Ondo de Esperanto, kiun nun eblas aŭskulti kiel ret-radion ĉe la-ondo.rpod.ru

- informo pri nova barokmetal-grupo el Brazilo kantanta en Esperanto


- mencio de la blogo ESPERANTO-MUZIKO (esperantomuziko.blogspot.com).

Aldone troviĝis pli detalaj priskriboj de du novaj diskoj, kiujn mi republikigas ĉi-sube:



Jacques YVART

Por sia 26a albumo Jacques YVART elektis Esperanton. Tio ne estas lia unua provo en la internacia lingvo, sed "Yvart kantas Brassens" (VKKD19) datumis jam de 1998!! Helpe de rimarkinda elekto de



kanzonoj (verskantoj), Jakvo evoluigas unu el siaj preferataj temoj: la vojaĝadon. Oni tiel trovas do kaj kanzonojn de Leonard COHEN (Birdo sur drato), de Johnny Cash (Diamantoj), de Georges MOUSTAKI (Mia liber'), de Georges BRASSENS (La ĉevaleto) kaj liajn proprajn elektitajn komponaĵojn el la plej bele adaptitaj en Esperanto: (En la valo de l' rozoj, Oe, oe en la ŝipo!, Magelanoj de l'Universo, ktp...); krome menciendas kelkaj poemoj enmuzikigitaj de li, ekzemple 'La invito por vojaĝo' de Charles BAUDELAIRE, kiu donas eĉ la titolon al la albumo.

La tekstaj adaptistoj, Rikardo CASH, Roel HAVEMAN, Marcel REDOULEZ kaj Ĵak LE PUIL, faris rimarkindan laboron kaj foje estas tre proksimaj al la originaloj, kio ne estas facila afero, precipe se temas pri kanzonoj.

La muzikista skipo, gvidata de Olivier

GÉRARDIN, estas menciinda kaj donas al ĉiu kanzono la ĝustan etosan tonon poluritan en la studio de la Trappe/Vinilkosmo fare de Triboulet.

Krom la 14 titoloj, tiu "lumdisko ekstra" entenas plusan muzikon de "La tempo de l' ĉerizoj", la karaokeajn versiojn de 14 titoloj kaj ankaŭ videosecion realigitan dum la registrado en la studio.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi: vinilkosmo.com/?disc=vkcd90&lng=e

Duoble Unu

Per tiu ĉi unua lumdisko la kompanio "Duoble Unu" invitas vin daŭrigi la vojaĝojn helpe de originalaj muziktitoloj, kiuj ampleksas diversajn muzikĝenrojn de la infankanto ĝis la engaĝita kanzono kun muzika vasto, kiu revekigas en aŭskultantoj la sentojn, memorojn kaj notojn el la tuta mondo!

Kiel en la koncertoj de "Tra la Mondo" (popolaj kanzonoj en 18 lingvoj), ĉiu kanto havas sian propran universon. Sursceneje tiu diverseco estas tamen perita nur de du personoj, danke al la redono kaj uzado de frapinstrumentoj, kiuj kompletigas la akordionon, gitarojn kaj kantadon. Surdiske la diversaj muzikaj koloroj estas substrekataj pere de niaj muzikaj amikoj: 30 el ili partoprenis en la produktado de la lumdisko.

Ĉio estis hejme registrita kaj la rezulto estas tiel bona kiel ĉe profesia laboro, danke al multaj laboraj horoj de Patrik pri la miksado kaj aliaj komputikaj aferoj, kaj ankaŭ danke al la mastrigado fare de la studio

Globe Audio en Bor-



dozo, kun kiu kutimas labori Vinilkosmo.

La stiloj kaj temoj estas diversaj (afrika popolmuziko, roko, baladoj, itala muziko, ĵazo, ktp...) pri infanoj: la alfabeto, krudeco al infanoj, akvopoluado, profitfarado kaj pri media rubo ktp... Ĉiuj tekstoj kaj muzikaĵoj estas verkitaj de Patrik DELABI kaj de Fransŭaz' ROCHETTE.

Ĉar tio estas "lumdisko ekstra" (lumdisko kun kromaĵoj), vi trovos ene, legeblaj per komputilo: bildrakonton laŭ unu el la kantoj, foton, karaokeajn versiojn de du kantoj, tekstojn kaj kelkajn partiturojn.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi:

vinilkosmo.com/?disc=vkdd91&lng=e

Por mem ricevi tiun informleteron, oni enskribiĝu ĉe vinilkosmo.com/?sch=&lng=e.

Sur la plurlingva TTT-ejo de Vinilkosmo eblas rekte mendi la eldonaĵojn kaj aliajn vendatajn lumdiskojn kaj kasedojn: vinilkosmo.com

Aldone Vinilkosmo havas retpaĝon ĉe *ipernity* (vinilkosmo.ipernity.com) kaj ĉe *MiaSpaco* (myspace.com/vinilkosmo).

Marcos CRAMER, laŭ la retpaĝaroj de Vinilkosmo kaj EUROKKA (artista.ikso.net/eurokka) kaj informleteroj de Vinilkosmo

Konkurso Partoprenu IJK-n 2008

Ni ĝojas anonci ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove povas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson. Ĉi-foje disponeblas 1100 EUR kaj eblas peti monon por parte kovri vojaĝkostojn (laŭ plej malmultekosta maniero buse, trajne aŭ aviadile), loĝadon en amasloĝejo kaj programkotizon (vi povas loĝi pli lukse, sed ni subvencias nur la prezon por loĝado en la amasloĝejo, do la diferencon vi pagos).

La estraro pritraktos la kandidatiĝojn kaj disdonos maksimume 5 premiojn (ĝis 3 malgrandajn kaj 2 pli grandajn) – la premioj fincos ĝis 80% de ĉiuj kostoj.

Kondiĉoj por kandidatiĝi estas:

- Vi estas membro de TEJO kaj aĝas sub 30 jarojn
- Vi aktivis en viaj landaj strukturoj / ene de TEJO aŭ aktivemas por TEJO
- Vi pretas partopreni en Aktivula Trejnado dum IJK
- Vi pretas kontribui al la IJK-a programo (ekz. per prelego)
- Vi pretas ricevi kaj realigi taskon de TEJO dum kaj post IJK (la tasko estas interkonsentota kun la TEJO-estraro)

Bonvolu kandidatiĝi per motiviga letero

al la TEJO-estraro, kie vi mencias

- Kial vi ricevu la premion
- Viajn aktivajojn ĝis nun
- Kiujn internaciajn Esperanto-aranĝojn vi jam partoprenis
- Kiel vi pretas kontribui al la IJK-a programo
- Ideojn pri taskoj kiujn vi povas fari por TEJO-agado

Krome skribu viajn

- nomon - naskiĝdaton
- adreson - vivokupon
- retpoŝt-adreson

Aldone bonvolu indiki viajn vojaĝ-, restad- kaj programkostojn, kaj kune sendu minimume unu referencan leteron. Se via kandidatiĝo ne plenumas ĉiujn kriteriojn, ĝi ne estos pritraktita. Via kandidatiĝo povas esti sendata retpoŝte al estraro@tejo.org aŭ paperpoŝte adresita al la Centra Oficejo kun la indiko TEJO – partoprenu IJK-n, kaj ĝi devas alveni ĉe ni antaŭ la 15-a de majo.

Se vi volas helpi la gejunulojn partopreni la IJK-n, bv. konsideri kontribui al la fonduso "Partoprenu IJK-n".

Vi povas sendi vian donacon pere de financoj@co.uea.org. TEJO dankegas pro via kontribuo!

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo
Retadreso: gregor@tejo.org

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)
Universitätsstr. 57, 8006 Zürich, Svisujo
Retadreso: annalowa@gmail.com

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)
A.B. Šimića 5 ,Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino
Retadreso: vildana.delalic@hotmail.com

• Sergej TYRIN (Kasisto)
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo
Retadreso: interdist@gmail.com

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450
Retadreso: rogener@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blogon ĉe tejo.org
- eblecon envolviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

Esperanto kiel ponto-lingvo NUN

Jen bona oportuno por montri la taŭgecon de Esperanto kiel utila ponto-lingvo:

La centra oficejo de la Monda Socia Forumo (MSF) en San-Paŭlo akceptis aldoni esperantajn tradukojn en sia portalo. En la tradukejo parolumondo.com/forumo/ jam estas kelkaj tradukitaj tekstoj de la Strategia Debato kaj nun ni komencas traduki ankaŭ la Oficialajn Bultenojn el esperanto, kiel ponto-lingvo. La teksto de la oficiala bulteno estas mallonga, do ni esperas oferti ĝin en pluraj lingvoj.

Niaj tradukoj aperos en la portalo kaj en la venontaj bultenoj de la Monda Socia Forumo antaŭ centoj da asocioj kaj miloj da homoj el la tuta mondo. Miloj da homoj, kiuj agadas ĉirkaŭ la MSF, sed parolas nenium el la kvar oficialaj lingvoj (portugala, hispana, franca kaj angla), serĉos niajn tradukojn. En la piedo de ĉiu traduko nepre aperos "traduko utiligante Esperanton kiel ponto-lingvo" kaj granda ligilo al www.esperanto.net (tiu retejo bele montras plurajn lingvojn).

Vizitu la tradukejon:

parolumondo.com/forumo

Ni esperas ke ankaŭ vi volonte klakos sur la ligilo <kunlabori> en la supra dekstra menuo ;-)

Dankon,

Emilio CID, San-Paŭlo, Brazilo

Laŭ la vortoj de Clauĉde Piron: "... La monda socia forumo certe estas la iniciato, kiu plej esperigas ĉiujn, kiuj deziras, ke enmondiĝu nova ordo ekonomia kaj politika, pli justa ol tio, kion oni nun trudas al ni kun la nomo "tutmondigo". Sed por efike agi, necesas efika komunikado, precipe inter la aktivaj elementoj de la plej alfavoritaj medioj. Necessas ankaŭ ŝanĝo en la maniero pensi, distanciĝo rilate al la valoroj, kiujn la amaskomunikiloj disvastigas: tiuj, tre ofte, esprimas nur la interesojn de la potencularo..."

Aperos nova lumdisko pri Esperanto

La 1-an de januaro 2008 Peter BALÁŽ, la kunordiganto de E@I, nome de E@I subskribis kontrakton kun la urbo Bjalistoko (la naskiĝurbo de Zamenhof kaj la urbo de la UK 2009) pri kreado de lumdisko¹ - multimedia disko, kiu per luda formo instruos Esperanton kaj prezentos la Esperanto-movadon al la pola publiko. La lumdiskon oni devas pretigi ĝis la fino de julio; laŭplane ĝi estos prezentita dum UK en Roterdamo. La lumdiskon planas

senpage eldoni la dua plej granda pola tag-ĵurnalo "Gazeta Wyborcza". La disko estos eldonita dufoje kaj la tuta planata eldonkvanto estas 300.000 ekzempleroj! Plej verŝajne tio estos nova rekordo pri la plej amasa Esperanto-eldonaĵo!

¹ lumdisko = kompakta disko

Laŭ E@Info